# EKO

**Esperiga Komuniko**

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- La 12a Mezorienta Kunveno
- La itala kongreso invitas al Triesto
- Senpaga membriĝo en UMEA
- Nova retejo de IEI en Hago
- Nova Eŭropa Bulteno
- Nova eldono de IPI.



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-06 sendita el Budapeŝto la 6-an deaprilo.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*


Por tuja uzo kaj plia diskonigo kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


# Pri la 12-a Mezorienta Kunveno kaj 54-a AMO-Seminario

Koncizigita el teksto de Renato Corsetti.

“Konata en la Okcidento estas “La Oriento estas mistera”, sed se ni rigardas nur al Esperantujo efektive estas la Okcidento, kiu estas mistera. Kie en okcidentaj landoj oni trovas landan asocion, kiu aĉetas sian sidejon en la  centro de la ĉefurbo, kiel ĵus faris la irana landa asocio de UEA. Kie oni trovas instruadon de Esperanto al universitataj studentoj en la kadro de la plej prestiĝa universitato en la ĉefurbo kaj en aliaj universitatoj de la lando? Kie oni trovas gejunulojn, kiuj sen diskrii sian junecon kunlaboras kun la pli aĝaj esperantistoj kiel egaluloj?




En plaĉe mezepoka konstruaĵo en la urbo de tapiŝoj kaj kaheloj, Kaŝano, sinsekvis prelegoj pri la stato de la movado en Irano kaj en aliaj mezaziaj landoj. Mi estis trafita de la kvanto da agado kaj eldonaĵoj de la irana movado, Ĝi havas grupojn en ĉiuj gravaj urboj sed ĉefe sentas respondecon pri ili. Alia specifeco de la irana movado estas ĝia seninterrompa ekzisto tra ĉiuj politikaj ŝtormoj de la pasinta jarcento. Ni ankaŭ aŭdis raportojn pri la stato de Esperanto en Uzbekistano,

Taĝikujo kaj aliaj mezaziaj landoj, Estis interŝanĝitaj planoj pri komunaj agadoj en Meza Azio. Pro la ĉeesto de Mireille Grosjean, prezidantino de ILEI. ni aŭdis pri problemoj en la fora Okcidento, ekzemple kiel aplikeblas la nova kotiz-sistemo en lando, el kiu oni ne rajtas sendi monon eksterlande pro la sankcioj de la tiel nomata Internacia Komunumo. Temis pri la plej granda Mezorienta Kunveno de la lastaj jaroj, bona atingo, se oni konsideras la malhelpojn pri vojaĝoj al Irano pro vizoj kaj pro malkonsiloj pri partopreno.




La plej konkretaj rezultoj de la AMO-Seminario verŝajne estos plifirmigo de kontaktoj kaj agadoj en Meza Azio kaj la entuzisamigo de iranaj sam-ideanoj, multaj el kiuj la unuan fojon spertis internacian kunvenon en sia lando. Temas pri io simila al la spertoj de la kongresanoj en Bulonjo-ĉe-maro."

PS: Tiuj eksterlandanoj venis el Britio, Francio, Svislando, Germanio, Taĝikio, Belgio, Rusio kaj Rumanio.

## Instrua Instituto havas novan retejon

La Internacia Esperanto-Instituto,IEI, havas freŝan retpaĝaron: http://iei.fontoj.net. Tiu instituto troviĝas en Hago, Nederlando, kaj estis fondita por konigi Cseh-metodan instruadon tra la mondo. Koran dankon al D-ro Christoph Klawe, prezidanto de UMEA, pro la informo.

Dr.Ferenczy Imre

## Senpaga membreco en UMEA

D-ro C. Klawe, la prezidanto de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) informis, ke ekde la 1-a de januaro 2019 la membreco estas senkosta en UMEA. Kuracistoj, apotekistoj, flegistinoj kaj aliaj medicinaj laboruloj povas aliĝi al UMEA. La aliĝintoj ricevas du prezidantajn cirkulerojn en la jaro, La jara abonkotizo de la *Medicina Internacia Revuo* estas 26 euroj. Pluajn informojn bv peti de

c.klawe@web.de

# ITALA KONGRESO en Triesto – EU en la tagordo




Kial indas partopreni la 86an italan Esperanto-kongreson en Triesto de la 24a ĝis la 31 de aŭgusto 2019? Eble ĉar tiu estas la sola kongreso en 2019, en kiu oni parolas pri konkretaj proponoj al EU rilate lingvon por ĉiuj eŭropanoj, tio estas Esperanto. Vytenis Povilas Andriukaitis, membro de la Eŭropa Komisiono kaj de la patrona komitato de UEA ĵus esprimis tiun deziron al Zlatko Tiŝljar, la sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu aranĝas riĉan programon en Triesto, en la kadro de la Itala Kongreso, Vidu ĉe https://kongreso2019.esperanto.it/eo/. Interalie oni raportos pri eksperimento financata de EU kaj nun farata en la lernejoj de kelkaj EU-landoj cele pruvi ankoraŭfoje la avantaĝojn de la lernado de neŭtrala helpa lingvo fare de infanoj en tre juna aĝo, kaj oni proponas al Eŭropo profiti de tiuj sciencaj rezultoj. Venu ankaŭ por diri persone al Eŭropa Komisionano, kion vi opinias pri Esperanto Aliĝu nun ĉe la supre retadreso



# Nova Eŭropa Bulteno

Ĉi tie aperis la nova Europa Bulteno: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno:

El la enhavo:

1. Grava sukceso por Esperanto en Kroatio
2. Dokumento de kroatia kulturministerio pri agnosko de Esperanto kiel kulturfenomeno protektenda de kroata ŝtato
3. Publikigita raporto pri la publika konsultado „Plurlingveco en europaj institucioj“ de la Eŭropa Ombudsmanokun klarigo de la Ofico de la Ombudsmano
4. Raporto pri la agado de EEU en 2018
5. Ni bezonas Esperanton en Eŭropa Unio
6. Invito al la Asembleanoj de EEU ĉeesti en la Asembleaj kunsidoj en Triesto
7. OSCAR-premioj al filmentrepreno “Esperanto-Filmoj

# Informilo por Interlingvistoj – nova numero

IpI (Esperante):
Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2019/03/IPI_107_Final.pdf

Pli fruaj numeroj: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/

IfI (angle): https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2019/03/IFI_107_Final.pdf

Pli fruaj numeroj: http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Monda Lingvaj Problemoj (CED). IpI disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ĝi enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatanoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj. Legu pli detale pri IpI kaj la lanĉo de IfI:

http://www.esperantic.org/eo/2017/07/20/esf-lancas-novan-bultenon-kaj-revivigas-alian/

La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 30a de junio, 2019.

Vortoj: 810

============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.